

Heinrich Heine,  
En Majo  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burĝonoj malfermiĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403  
(2004-04-05 20:37:00)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,  
Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,  
Als alle Knospen sprangen,  
Da ist in meinem Herzen  
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,  
Als alle Vöglein sangen,  
Da hab' ich ihr gestanden  
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.*

Heinrich Heine,  
En dolĉega Maj'  
*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin ekleviſ.

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum birda kanto sonis,  
De l' kora mi sopiro  
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04-03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germanalingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*